RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
01/02/2020 08:33:38

Premiitoj de la internacia konkurso Domo de Amerikoj

Ĉi-semajne estis diskonigitaj la rezultoj de la premio Domo de Amerikoj, kies 61-a eldono okazis en Havano. La prezidanto de tiu kulturkleriga institucio, Abel Prieto kaj Alpidio Alonso, ministro de kulturo, ĉeestis la premian ceremonion.

La kuba verkisto Abel González Melo gajnis la Premion Domo de Amerikoj 2020 en la sekcio Teatro pro la teatraĵo *Bayamesa, rekviemo por Maria Luisa Milanés*, teksto kiu “evidentigas, inter aliajn virtojn, dramaturgon maturan, kiu fluas klare kaj profunde”, deklaris la ĵurio de la prestiĝa konkurso.

En la sekcio de rakontoj, la gajninto estis la meksikano José Manuel Ríos Guerra pro la verko *La literaturo estas serioza afero*, kiu laŭ esprimis la ĵurio, konsistigas “ensemblon de rakontoj koheraj (…) plejmulte inĝeniaj”.

Aliaj premiitoj estis aŭtoroj de Meksiko, Gvatemalo, Portoriko, Brazilo kaj Martiniko.